

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugaliaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj $2\frac{3}{12}$.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petiltinio. 10 % rabato por duonjaraj, 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 4 (40)


la 12:an de septembro 1899

IV:a jaro.

Al niaj abonantoj en Rusujo ni sciigas, ke la plej bona maniero sendi monon al la Ekspedejo estas per franca papera mono. Rusan paperan monon ni ankaŭ akceptas.

Poŝtsignojn rusajn ni, kontraŭe, ne povas akcepti.

La Ekspedejo de L. I.



"Ankaŭ da malbono."

En la n-ro 1 de L. I. 1899 sin trovas sur la paĝo 5, en la unua paraĝrafo sub la rubriko "Pri Esperanto parolis", la sekvanta diro: "*Francujo* estas la lando, kiu ankaŭ en tiu ĉi afero iras antaŭ la aliaj kiel portanto de la standardo. Ni estas kutimigitaj lerni de tie multege da bono — ankaŭ da malbono, sed pri tio ne estas nun la parolo —, kaj en la lastaj tempoj la francoj instruis nin, kiel plej bone kaj efike propapandi nian lingvon."

Tiu ĉi jen citita frazo "ankaŭ da malbono" kaŭzis ĉe la esperantistoj kondukantaj en Francujo malkomprenon, dubon kaj indignon. Tial mi, kiu estas la skribinto de tio, ŝuldas klarigon.


Mi konfesas, ke la diro havas neklaran formon, kiu ne baras la vojon al malkompreno. Anstataŭ "*ni* estas kutimigitaj" mi devus diri "la popoloj eksterfrancaj" aŭ simile. Ĉar al mia animo prezentis sin, tion skribante, la multo ĉiuspeca, kion dum la daŭro de la historio ni nefrancoj lernis kaj lernas el Francujo en ĉiuj regionoj de la civiliza vivo. Francujo estas la lando, kiu ni plej multe rigardas por lerni de tie, kaj ni tute ne rigardis vane: ni multege lernis — tio estas fakto. Sed ĉiuj lernoj ne estis bonaj — tio ĉi estas ankaŭ fakto.

Tio ĉi estas por mi aksiomo. Sed mi konfesas, ke mi eldiris ĝin *en neĝustaj rilatoj* kaj en formo, kiu povas naski kaj efektive naskis malkomprenon.

Profunde bedaŭrante, ke tiu dusenca kaj, en tiu ĉi loko, tre banala frazo estis enmetita en la gazeto, mi certigas al la esperantistoj francaj kaj aliaj, ke mia intenco tute ne estis subkomprenigi ion mallaŭdan pri la agado, kiun faris kaj faras en la servo de Esperanto la Komitato de la S. p. p. Esperanto, nek pri tia agado de aliaj francoj. Certe, mi konsideras la agadon de la S. p. p. Esperanto kiel treege laŭdindan en ĉiuj detaloj kaj benigan.

Mi tial petas, ke la koncernataj estu konvinkitaj pri mia malĝojo je tio kio okazis kaj favore akceptu mian peton pri pardono por la malplezuro, kiun mi kaŭzis al ili.

Paul Nylén.



Novaĵoj.

Esperanto en la Ekspozicio Pariza 1900. S-ro K. Ostanieviĉ skribas al mi, ke la Societo Espero ricevis malgrandan loketon en la pariza tutmonda ekspozicio kaj intencas meti tie vitrinon kun esperantaj verkoj kaj aranĝi vendadon de lernolibroj. Li esperas ke tiu ĉi vitrino estos centra loko por ĉiuj esperantistoj, kie ili povus enskribadi en speciala libro siajn adresojn.

* * *


La sekretario de la Klubo Esp. Stokholma dissendis al la klubanoj la 6-an numeron de la "*Sciigo de l' estraro*", enhavantan la konigon pri la reeldonado de L. I. kaj la admonon, ke ĉiu el ili apogu ĝin per abono.

* * *

Ofero. Fraŭlino Hilda Cederblad oferis por la celoj de nia gazeto kronojn 10.

* * *

"Stenografio Internacia" de s-ro P. Ahlberg estas aĉetebla, krome ĉe la verkinto, ankaŭ ĉe D-ro Zamenhof.



Juĝo de virino.

Verkis Mabel Margaret Thompson.

En komforta, belege meblita ĉambro sidis du personoj ĉe la lumo de lampo, unu viro kaj unu virino. Ŝi estis apenaŭ dudekjara kaj alta, belkreska. Ŝia vizaĝo estis neordinare bela kun siaj rondaj, infanaj konturoj kaj la molaj linioj de l' buŝo; sed la grizaj okuloj estis pensemaj, revantaj kaj subrakontis pri la troekstremataj idealoj kaj alten serĉantaj celoj, kiuj enestas ĉe ni en la printempo de l' juneco. Li staris apud ŝi kaj rigardis ŝin kun dolĉa, tamen kvazaŭ ironia rideto. Li povis esti tridekjara aŭ pli, kaj lia vizaĝo subrakontis klare pri bataloj elbatalitaj kaj sukcesitaj, pri vivo, kiu sinrompadis kun la mondo kaj sciis tamen konservi la purecon de la koro.

— Kio estas, Ruth? Kio estas tiu ĉi terura io, kio povas meti sin inter ni kaj nin disigi por ĉiam? Eldiru ĝin al mi kaj lasu min montri al vi, ke ĝi estas nur aprila neĝo, kiu forfluidiĝos.

— Vi ne devas agi pri ĝi tiel facilanime, Rikardo, — respondis ŝi kun rigardo ĉagrena. — Estas demando tre serioza kaj kiu *fariĝas* konstante pli grava, kaj — ni virinoj devas fari nian devon, kion ajn ĝi kostus. Miss Rogers diris al mi tion.

— Estu malbenita la miss Rogers. Mi petas pardonon, sed kiel do la honorinda maljuna fraŭlino havas rilaton ian kun ni? Kio estas tiu ĉi demando, Runjo? Vi igas preskaŭ miajn harojn sin starigi, kiam vi nomas min Rikardo per tiu ĉi tono.

— “Riĉjo“ estas tute tro facilanime, — diris ŝi — kaj miss Rogers estas tre inteligenta, elvovita sinjorino kaj, krom tio, bona mia amikino.

— Ho, efektive!

Fariĝis momento de silentado, poste Ruth daŭrigis:

— Ŝajnas al mi, ke *efektive* estas tiel *abomeninda* vorto. Mi deziras, ke vi volu ne elĵeti ĝin al mi tiamaniere!

— Tio min malĝojigas. Mi supozas, ke mi devis diri *komprenoble*. Aŭdu, Runjo, mi volas ekscii ĉi tion, kio metis sin inter ni.

— Nu do, Rikardo, estas tio — komencis ŝi, kunigante la manojn sur la genuoj kaj esplorante obstine la desegnaĵon de la planktapiŝo — mi volas ke vi pensus, pensus pri tuta via vivo — *vi* scias kia estis la mia — kaj rigardus, ĉu ekzistas en la pasintaĵo io, kion vi ne povos ekdiri al mi, io, pri kio vi ne volus ke mi ankaŭ ĝin farus. Mi estas efektive plene serioza nun — ne, ne penu haltigi min! Vi havos duonhoron por pripensi tion, kion mi diris.

Mallaŭta brueto de siklaj jupoj, kaj jen Rikardo estis sola. Li enrigardegis sensente la fajron, kaj iom post iom ŝanĝiĝis la esprimo de lia vizaĝo. Ĝi kvazaŭ ekmalmolĝis. Ekestis io akra ĉe la buŝo, kaj li elvidis tuj maljuna. La momentoj forpasis, la horloĝo daŭrigis tiktaki, unu el la brulaĵoj en la fajro ekfalas, kaj fajreris tie interne. Denove estis aŭdata la sono de la silkaj jupoj kaj facilaj paŝoj. Li turnis sin renkonte al ŝi kun malvarma vizaĝesprimo.

— Ĉu vi volas diri — parolis li severe — ke se mi ne povas laŭvere diri, ke tuta mia pasinta vivo estis tiom pura kaj senmakula kiel via propra, vi tiam reprenos vian promeson? Ĉu vi volas diri, ke vi do volas rompi vian ligon kun mi?

— Tio estas mia devo, Rikardo — respondis ŝi, turnadante nervume siajn ringojn.

— Aŭdu do. Ekzistas en mia pasintaĵo okazoj, kiujn mi estas dankema ke vi neniam povos ekscii. Mia vivo ne estis senriproĉa, ĝi estis longdaŭra, severa batalo, kaj mi ricevis kaj donis multajn batojn. Mi scias tion, ke je ĉiu fojo kiam mi estis batita, je ĉiu fojo kiam mi ekfalas, mi ekstarigis kun novigita forto kaj fariĝis pli elvolvita per tio. Mi vidas, ke vi min juĝis — ke vi estas jam refuzinta min en via koro. *Vi* staras tie ĉi min juĝanta. *Vi!* Kion scias *vi* pri peko — aŭ tentoĵ? Vi, kiu estis de la infaneco konservata el ĉia koneco pri la mondo, vi, kies pureco estis zorge ŝirmata, kies vivo estis vivata inter homoj, ĉe kiuj *vi* estis ilia sola penso. Kion vi povus scii pri la vivo de viro, pri la profundego de peko, kiu ĉirkaŭas lin ĉie, pri tiuj tentoĵ, kiujn li kontraŭstaris kiel ankaŭ tiuj, al kiuj li cedis? Kiam tento estas venkita, peko pentita, tiam nur ekhavas la viro kaj la virino la solan efektivan, veran forton; kaj mi estas viro pli pura hodiaŭ, pri vi pli inda laŭ ĉiuj koncernoĵ, ol mi estis antaŭ dek jaroj, kiam ne ekzistis io en

mia pasintaĵo, kio vin igus returni vin de mi. Mia amo estas pli pura kaj malpli egoista, ol tiu kiun mi povus doni al vi tiam! Ho, Ruth, vi ne havas antaŭsenton je tio, kiel maldolĉe la pento povas esti sentata, kiel terure la memmalestimo, nek kiom da forteco ĝi donas! Je unu tago vi eble scios kaj komprenos ĉi tion!

Li ekhaltis, kaj kiam ŝi ne respondis, li spite me reĵetis sian kapon.

— Mi vidis vian decidon, — daŭrigis li. — Se tio estas, kion vi nomas via amo, do vi retenu ĝin. Adiaŭ.


Li fermis malantaŭ si la librejan pordon kaj estis sola en la granda ŝpare lumigita vestiblo. Mato sur la planko estis sin faldiginta kaj li klinis sin meĥanike kaj metis ĝin en ordon, dum li botonumis sian surtuton.

— Al kio tamen servas diri al virino la tutan veron? — li murmuris kaj turnis sin por iri, sed iu vokis per duonsurdigita voĉo:

— Ho, Riĉjo, revenu! — Ŝi staris en la malfermo de l' pordo kun siaj mallarĝaj, blankaj manoj aletenditaj kun peteganta gesto.

— Vi estas prava, Riĉjo, — balbutis ŝi, — mi ne kuraĝas vin juĝi.

Tradukis **Paul Nylén.**



Skizoj de Baku.

III. Balahiani.

Nordorienten de Baku, en kratero, preskaŭ en la centro mem de la nemultfrukta Apŝerona duoninsulo, estas lokata unu grupo da kelkaj negrandaj lagoj de maldolĉsala akvo, kiuj estas, kiel ankaŭ la Kaspia maro, restoj de granda maro, kiu enplenigis en la antaŭ-historia tempo la tutan malaltaĵon de Meza kaj Okcidenta Azio kaj kunligiĝis kun la Nigra maro; tiuj ĉi lagoj estas nomataj laŭ la najbaraj vilaĝoj: Sabunĉi, Romani kaj aliaj. Tiu ĉi kratero estas nun la loko de la plej riĉa (ne nur en Rusujo, sed ankaŭ en Eŭropo) akiro de nafto.

La nemultaj, neprofundaj putoj, el kiuj la nafto estis akiradata jam en antikvaj tempoj, apartenis al la registaro de la bakua ĥano, kaj post la al-milito de la bakua ĥanregno, ili kune kun la ĉirkaŭigataj terpecoj, fariĝis propraĵo de l' rusa regno, kiu fordonis ilin al farmistoj. En la fino de la 60-aj jaroj de la nuna centjaro, en sekvo de pligrandiĝinta postulo de nafto, la registaro faris el la parto de scienaftporta tero kvartalojn, kiujn ĝi vendis al privatuloj por akiro de la nafta riĉeco, troviĝanta en iliaj internoj; la kosto de tiuj ĉi terpecoj estas nun, kompreneble, multdekoble, eĉ multcentoble pli granda, ol la komenca. La registaro nun jam ne vendas la naftportajn terpecojn, sed fordonas ilin al farmistoj, kiuj pagas difinitan pagon por ĉiu pudo da akirata nafto.

En la I:a skizo (L. I. 1898. V) la akirproceso jam estis klarigita komune; ni priskribu ĝin pli detale. Kiel jam estas dirita, la nafto estas akiradata el putoj, kiuj estas borataj, kiel ĉiuj similaj "artesianaj" (*d' Artois*) putoj, sed oni devas bori ĝis la profundeco sufiĉe granda — 400 metroj kaj eĉ pli. Komencante la boradon, oni metas sur la difinita loko lignan longforman stalon kun kvarangula mallarĝiganta turo sur unu ĝia fino, kies celo estos montrita pli malalte; tiun ĉi konstruaĵon oni nomas "*viška*"; la borilo, per kiu oni boras, estas fortikigata sub la turo, kaj en la alian parton de la stalo oni metas vapormaŝinon, por kiuj la kaldronoj estas lokataj ordinare en

interspaco de kelkaj dekoj da metroj de l' turo, kaj estas komunaj por ĉiuj maŝinoj de tiu ĉi akirloko.

La borado, t. e. la pliprofundigo de la borilo teron, estas faradata per maŝino, kaj laŭ ĝia pliprofundigo la fariĝata malfermo estas fortikigadata per fandferaj tuboj de egala diametro (12 anglaj coloj estas sufiĉe ordinara mezuro), kiuj estas enbatataj de supre; tiuj ĉi tuboj, kompreneble, restas en la tero ankaŭ post la fino de l' borado; al la borilo mem oni alfortikigas, laŭ la pliprofundigo, ŝtalajn stangojn — unu post alia, — per kiuj oni turnas la borilon; la tero, elpremadata per la borilo, estas eltiradata per tiu sama maŝino ile "jelonka", t. e. longa sitelego de diametro preskaŭ tiela sama, kiel la tubo; la fundo de tiu ĉi sitelego estas konstruita tiel, ke ĉe ekbato je malmola supraĵo, ĝi eniras internen, kaj la enhavo elverŝiĝas aŭ elŝutiĝas; tiu ĉi sitelego estas alfortikigata al ŝtala ŝnurego, kiu estas transjetata trans unu rado, lokata en la supro de l' turo (por tio ĉi ĝi estas difinita), kaj poste estas volvata cilindron, kiu estas movata per la maŝino.

Kiel jam estas dirita, la nafto (laŭ la plej propagandita hipotezo) troviĝas en la tero en apartaj kavernoj; en ili sub la nafto troviĝas ankaŭ akvo, kaj sur la nafto gasoj, kiuj iafoje per sia premado sekvigas tiujn naftajn fontanojn, unu da kiuj estis priskribita en la I:a skizo.

Post la fino de l' borado, oni komencas ĉerpadi la nafton ile tiu sama sitelego. Super la malfermo de l' borputo estas konstruita negranda ĉirkaŭbaro; kiam la sitelego estas levita el la borputo supren, oni surŝovas sur la ĉirkaŭbaron lignan kovrilon kaj mallevas sur ĝin la sitelegon, kies fundo, sin ekbatinte je la kovrilo, sekvigas la elverŝiĝon de l' enhavo, la nafto fluas laŭlonge la malgranda kanalo en unu grandan kavon ("lagon"), elfositan en la tero, kie ĝi estas konservata ĝis la fluigo en fabrikojn, kio estos priskribita pli malsupre. Iafoje, post la fino de borado, oni ĉerpadas dum kelkaj tagoj nur akvon, sed tio ĉi ne malkuraĝigas la posedulon, ĉar, plej ofte, la plimalgrandigo de la tavolo de akvo en la difinita sulko de terŝelo sekvigas la alfluon de nafto.

Dum la unuaj tempoj de la nafta industrio, la nafto estis transportadita en fabrikojn de la Nigra Urbo ile manieroj sufiĉe simplaj: duradaj aziaj veturiloj ("arba"), kameloj k. c.; ili eniradis aŭ enveturadis la naftan lagon, plenigadis per nafto la konformajn fluidaĵingojn (barelojn, felojn) kaj senfinvice direktiĝadis en la Nigran Urbon. Sed en la fino de la 70.aj jaroj oni komencis fluigi tien ĉi la nafton ile pumpoj kaj "naftokondukoj", t. e. tuboj, kaj nun multo da ili, apartenantaj al multegaj kompanioj, direktiĝas de l' akirlokoj Nigran Urbon; apud la naftokondukoj kuŝas ankaŭ tuboj, kiuj kondukas en kontraŭan direkton, — de l' mara bordo en la akirlokojn — unu alian fluidaĵon: la maran akvon, kiu, en sekvo de senakveco de Apŝerona duoninsulo, estas sola, kiun oni povas metadi en vaporkaldronojn; la vapormaŝino estas ĝis nun la sola ebla movilo en la akirlokoj: malgraŭ la malkareco de keroseno kaj benzino, la uzado de la gasmaŝinoj estas malebla, ĉar oni devas senĉese ŝanĝadi la direkton de la efikado de maŝino (por levado kaj mallezado de la sitelego), kaj tio ĉi estas ebla nur ile vapormaŝino.

La unuaj naftotuboj estis trametitaj de svedo A. Nobel, fondisto de la glora kompanio "Fratoj Nobel"; la bakua nafta industrio estas dankema al li ankaŭ por tio, ke li unuafoje uzis la verŝŝipojn por la transportado de keroseno sur la Kaspia maro kaj la riveroj; tio ĉi baldaŭ malkarigis en Rusujo tiun produkton, kiu antaŭe estis transportata en bareloj; la dankemaj

bakuanoj nomis la straton, kiu ligas la centron de Baku kun la Nigra Urbo, "prospekto de Nobel".

Ekparolinte pri homo, al kiu la bakua industrio estas tiel dankema, oni ne povas ne diri ankaŭ kelkajn vortojn pri alia homo, al kiu ĝi estas ankaŭ tre dankema, — pri S. Ragozin. Kiel estas sciata, la nafto unuatempe estis uzata nur por fabrikado de lumoleo — kerseno; la restaĵoj de tiu ĉi fabrikado, nomataj "mazut", en kaŭzo de tiama foresto de fornoj, taŭgaj por ĝia brulado, — nur pligrandigadis senprodukte la koston de l' fabrikado. Ragozin montris, ke el tiu ĉi produkto oni povas, ile partuma distilado, eltiri ankoraŭ multon da duumaj produktoj de granda indico: kelkajn specojn de maŝinoleo (cilindroleon, ŝmiroleon, ŝpiniloleon kaj aliajn), naftan sebon, vazelinon, gudronon por anstataŭigo de asfalto kaj multajn aliajn. Unnaflanke — tio ĉi, aliaflanke — la elpenso de fornoj, en kiuj la dispolvigadata mazut' forbrulas, donante tre altan temperaturon, — ĉio tio ĉi sekvigis postulon kaj plikarigon de tiu ĉi produkto, kiu antaŭe estis tiel ŝarĝema por la fabrikado; multaj fabrikoj nun jam ne ricevas la mazut'on kiel flankan produkton ĉe fabrikado de keroseno, sed kontraŭe — la nafto estas prilaborata por ricevaĵo de mazut', kaj la keroseno aperas kiel flanka produkto.

Tia akiro de nafto estis unuafoje komencita sur la plato ĉe la Sabunĉia lago, inter la vilaĝoj Sabunĉi kaj Balahani. Oni veturadas tien el Baku ordinare per la fervojo (preskaŭ 13 kilometroj); apude estas situaciita ŝtonvojo (*chaussée* — ŝose'), laŭlonge kiu moviĝas senĉese veturiloj kun maŝinaj partoj, fero, tuboj k. c. La vojo pasas facile-montetuman, sabluman, malbone-prilaboritan lokon. Tiuj ĉi vilaĝoj kaj la plato inter ili prezentas unu stranĝan homan kolonion, kie oni preskaŭ ne vidas domojn, sed la borturoj estas situaciataj tre dense, kaj de proksimo — Balahani-Sabunĉi ŝajniĝas kiel amaso de borturoj, kovranta la horizonton. Ĉar la terpecoj tie ĉi estas tre karaj kaj bezonaj por la uzo (rimarkinte la konsumon de unu borputo, oni boras en proksima najbareco unu alian), — tie ĉi nur sur la akirlokoj de grandaj firmoj (Nobel, Rothschild, Benkendorf, Ŝibajev k. a.) ekzistas pli-malpli konvenaj domoj por la oficistaro; sur aliaj do tio ĉi estas nur mizeraj dometoj, kiuj ne faras domaĝon, kiam oni devas detrui ilin. La kvartalo de ĉiu posedulo prezentas unu pentruman kolekton de tiaj dometoj, terdometoj por la laboristoj, kaldrondomoj kaj borturoj, borturoj, borturoj — senfine ĉiaj borturoj: konstruitaj antaŭnelonge, brilantaj sub la suno per siaj tabuloj, kaj pli-malpli malnovaj, forŝprucitaj per nafto, eknigrigintaj. Inter tiuj ĉi kvartaloj pasas la vojoj, trahakataj kaj akompanataj per naftkondukoj kaj akvokondukoj, kun kavoj apud la randoj, laŭlonge kiuj ĉiuj forĵetaĵoj kaj malpuraĵoj de akirlokoj fluas en la lagojn Sabunĉian kaj Romanian, kiuj ĝis nun — laŭ la tradicio — estas opiniataj maldolĉsalaj: estus pli precize nomi ilin mazutokunflujaj.

Tiu ĉi kolonio havas originalan fizionomion, kian havas ankaŭ aliaj akirlokaroj en ĉirkaŭaĵoj de Baku, sed nenie tiel karaktere. La laboristoj tie ĉi estas la plej diversaj nacioj: rusoj, "kazanaj" tataroj el la orienta parto de eŭropa Rusujo, kaj tieaj loĝantoj: armenoj kaj mahometanoj de Transkaŭkazo, kiuj estas nomataj de la rusoj ankaŭ tataroj, nur kun klariganta adjektivo "aderbejĝanaj" (Aderbejĝan — kun ĉefurbo Taŭriz' — estas provinco de Nordokcidenta Persujo, kiu estas loĝata de tiu sama gento); ili mem sin nomas "türk" kaj estas idoj de turkaj gentoj — selĝukoj kaj taĝikoj, kiuj estis alvokitaj en la VIII kaj IX centjaroj de la bordoj de Amú-Darjâ en


Meza Azio de la araboj, kiuj al militis la fajradorintan Persujon, — por la humiligo de ribeloj; la turkoj do, loĝantaj Malgrandan Azion k. c. kaj potencantaj en Turkujo, sin nomas mem “osmanli“. Gardistoj estas pleje anoj de tiuj multnombraj malgrandaj, militemaj kaj kavalaraj gentoj (avaroj, kjurinoj, andioj, kazi-kumilioj, tabasaranoj k. a.) de Dagestan’ (“lando de montoj“ — turke), nomata ankaŭ “monto de lingvoj“, — kiuj estas konataj sub komuna nomo “lezginoj“; en Dagestano ekzistas multo da lingvoj kaj dialektoj (ekzistas tiaj, kiuj estas nekomprenablaj jam en la plej proksimaj vilaĝoj, sed por ĉiuj ili la lingvo avara estas — estu permesita diri tion ĉi — la lingvo internacia; por ĉiuj do nacioj, loĝantaj en Kaŭkazo Orienta kaj en Transkaŭkazujo tielan rolon ludas la aderbejĝana dialekto de turka lingvo, tiu lingvo, je dialektoj de kiu parolas multaj milionoj da homoj, komencante de la bordoj de l’ Adriatika maro ĝis la ebenajoj de Orienta Azio, eĉ post la limoj de Ĥinujo. Tiu ĉi homaro, vestita je kostumoj, sorbigitaj je nafto, kaj — laŭ kaŭkazo-azia kutimo — vintre kaj somere je felaj ĉapoj; — la gardistoj ankaŭ je bataliloj — fajropafa kaj nacio-kaŭkaza rekta, larĝa, ambaŭflankeakra ponardo, — prezentas originalan pentraĵon, en kiu sin perdas la nemultaj balaĥanianoj, vestitaj eŭrope — oficistoj, majstroj...

La pligrandiĝanta akiro de nafto kaj rimarkebla konsumo de Balaĥani-Sabunĉia placo postuladis kaj postuladas serĉadon kaj akiron de nafto en aliaj lokoj. Al la legantaro jam estas konata la negranda, sed riĉa nafta placo de Bibi-Ejbat. Tute nature, la plej proksimaj lokoj, kie komencis disvolviĝi la akiro de nafto post Balaĥani — estis la najbara placo ĉe la vilaĝo Romani; la konsumo de Balaĥani-Sabunĉia placo estas rimarkebla, ekzemple, de tio, ke, kvankam la akiro de nafto ile ĉerpado estas preskaŭ egale produktema en Romaniaj kaj en Balaĥaniaj akirlokoj, en la lastaj jam kelkaj jaroj ne aperis fontanoj; dume en Romani aperadis fontanoj, kiuj aliformigis en la daŭro de du monatoj la posedulon de l’ akirloko el neriĉa homo — milionulon. Por kuriozo, ni rimarku okazon, kiam la fontano kaŭzis malprofiton al siaj poseduloj, kaj ili ekrapidis ekbruligi ĝin; la afero estas, ke la fontano elĵetas ankaŭ multon da sablo, ŝtonoj kaj akvo, de kiuj oni devas purigadi la akirlokon; ĝi superverŝas la najbarajn akirlokojn; por konservado de la nafto, kiun oni ricevas sen iaj ajn elspezoj, oni bezonas rapide elfosadi kavegojn; tio ĉi sekvigas sufiĉe grandajn elspezojn, kiuj je ekzistinta tiam malalta kosto de nafto — ekaperis malprofitaj. La fontano povas esti divenota kelke da tempo antaŭe: en la borputo ekkomencas karaktera bruado de l’ gasoj, ekrimarkiĝas altiĝo de l’ nivelo de nafto, superverŝado je l’ malfermo de l’ tubo k. c.; tiam atendante la fontanon, kiu, regulata per nenio, dispolvas multon da nafto en la aero senprodukte, — oni pendigas super la malfermo de bortubo dikajn ŝtalajn platojn, kiuj malpermesas al la elĵetata nafto leviĝi aeron kaj direktas ĝin en kavegon; la sablo, elĵetata kune kun la nafto, trafrotas rapide tian platon, kaj oni devas pendigi novan iafoje jam post kelkaj horoj.

Krom Romani esploroj kaj akiro de nafto estas farataj ankaŭ en aliaj lokoj de Apŝerona duoninsulo (Sarai, Benigadi), kaj ankaŭ en najbaraj lokoj sur la bordoj kaj insuloj de Kaspia maro; ekzistas eĉ supozo boradi en mezo de l’ maro mem. La elekton de loko por la borado sekvigas ne nur la proksimeco al la sciencportata terpeco, sed ankaŭ la opinioj de specialistoj — geologiistoj aŭ minejningeneroj, — juĝantaj laŭ la dismeto de l’ tavoloj de terŝelo pri la ebleco de renkonto la nafton ne tro profunde. Fine, por la bakuj

akirlokoj aperis forta konkuristo — la akirlokoj de Grozni apud la nordaj antaŭmontaĵoj de la Kaŭkazaj montoj; cetere, la nafto tie ĉi estas de pli malgranda speciala pezo, eldonadas pli multe da benzino kaj keroseno, sed tial pli malmulte da mazut' kaj da ĝiaj multkostaj produktoj. Krom tio, la nafto jam estas akirata ankaŭ en aliaj antaŭmontaĵoj de Kaŭkazo: apud Tiflis, Batum, Anapa, Novorosisk (tiuj ĉi tri urboj estas kuŝantaj sur la bordo de Nigra maro), kaj aparte apud Kudako en la regiono de kozakoj de Kuban.

M. M. Abesgus.



Rebusoj.

De Paŭlo de Lengyel.

I. Ŝako.

ĉa	zi-	ru	fan-	vo,	loj	per	e-
mia	ta-	re-	o,	*Di-	ta	son-	kaj
ta-	Dol-	La	vi	ku-	Su-	po-	kre-
zi'?	bel-	du-	man.	o:	en	bu-	ĝo
vi	fan-	ĉi-	o-	kis	be-	o	De
an-	Ne,	Kof-	Tra-	ĉar	po-	ru	ŝet,
per	tas	ne,	lo,	tas	ne	la	de
ho	ĝe-	su-	es-	et'.	Di-	Es-	ĉu

Solvota laŭ ĉeval-saltoj. Steleto signas la komencon.

II. Anagramo.

e, m, m, n, o, o, o, p, t.

Aranĝu el tiuj ĉi literoj du substantivojn: 1) ion pasantan, 2) ilon universalan por aĉeti kaj vendi. Se oni forigas la unuan silabon de l' unua vorto kaj la duan silabon de la dua vorto: vi ricevos gustan frukton.

La solvojn oni ensendu al la redaktoro.

ANONCOJ.

Anoneaj agentoj!

Ni deziras anoncajn agentojn.

Sin turnu al

Ekspedejo de Lingvo Internacia

Luleå (Svedujo).

Libera loko por anoneo.